**Novjorka Prismo**

Numero 104 Majo 2001

*La Esperanto-Societo de Novjorko*
*kore invitas vin al sia maja kunveno*


Dato: Vendredon, la 18-an de majo 2001, 6:30-9:00 ptm

Loko: United Federation of Teachers
260 Park Avenue South (20th/21st Streets), NYC
2nd floor (check schedule in lobby for room number)

Programo: 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.
7:00 – Prelego de Tomoko Yamashiro:
*Kulturo kaj Lingvoj de Okinawanoj en Japanio kaj Bolivio.*
Post la prelego ni ludos kelkajn lingvajn ludojn. ★

## Protokolo de la kunveno de la 20-a de aprilo 2001

Je 7:10 ptm, Tomaso ECCARDT malfermis la kunvenon. Dek kvin personoj ĉeestis. Ĉeestis tri gastoj: Normando LEGAULT, el Kanado; Yingjie ZHANG, el Ĉinio; kaj Misha KRATOCHVIL, ĉeĥino, kiu studas ĉe Columbia University.


*Normando Legault el Kanado.*



*Yingjie Zhang el Ĉinio.*


*Misha Kratochvil el Ĉeĥio.*

La protokolo de la 16-a de marto estis akceptata.

Tomaso parolis pri venontaj klubaj eventoj: la ĉi-jara pikniko; la ĉi-someraj renkontiĝoj; la ĉi-jara kandidatiga komitato; kaj la pulmerkato en majo.

Rochelle F. GROSSMAN anoncis, ke Lillian RACHELE, kiu verŝajne transloĝiĝos al Oregon, donacis al nia klubo malnovajn ekzemplerojn de la revuo *American Esperantist*, kiujn ŝi proponas donaci al ELNA se ĝi ne havas ilin. Lillian ankaŭ lasis malnovan kopion de novangluja kantolibreto, kiun Rochelle proponis sendi al Michael LEWY, nia klubano, kiu loĝas apud Bostono. Rochelle donis pinglojn al kelkaj personoj senpage.


*Rochelle Grossman kaj Tom Eccardt en* Vitra Tramo.

Sofiya SOSKINA raportis, ke ĝis nun, 48 personoj pagis la ĉi-jaran kotizon por membreco en nia klubo, kaj estas 18 abonantoj, kaj pagintaj kaj ne-pagintaj.

Je 7:30 ptm, Tomaso anoncis la teatraĵon, *Vitra Tramo sur Varmega Lada Tegmento.* Tomaso klarigis kelkajn vortojn, kiuj ŝajnus strange sen eksplikado. Li ankaŭ menciis, ke tiu ĉi teatraĵo, kiun li mem verkis sub la plum-nomo Tenesio TOMEKARTO, estas parodio de la teatraĵoj de Tennesee Williams. Tomaso , Rochelle, Pamela LIEBER kaj Stuart GREEN estis la kvar aktoroj, kiuj rolis en la teatraĵo.

Je 8:40 ptm, la teatraĵo finiĝis, kaj Tomaso fermis la kunvenon. Tuj poste, kelkaj personoj iris al la restoracio My Cousin Vinny's por manĝi kaj trinki. ★

*Protokolis:*
*Stuart GREEN*


*Pamela Lieber kaj Stuart Green dum la teatraĵo.*

## Koalicio por Internacia Help-Lingvo

La 3-an de majo okazis la dua seminario de la NRO Coalition for an International Auxiliary Language ĉe 777 UN Plaza. Mark Fettes, direktoro de la Esperantic Studies Foundation, estris la seminarion kaj prelegis pri *Free Market or Fair Market? A Language Agenda for the NGO Community.* Humphrey Tonkin, honora patrona komitatano de UEA, prelegis pri *Parity Begins at Home: Language Rights and the United Nations.* Sekvis diskuto kaj rekomendoj.

Partoprenis la sekvantaj neregistaraj organizaĵoj (NROj): Baha'i International Community (Linda Deputy), Cairo Institute for Human Rights Studies (Hanny Megally), International Shinto Foundation (Hiroko Sugimoto), Transnational Radical Party (Marco Perduca), Universal Esperanto Association (Ulrich Becker kaj Rochelle F. Grossman), World Federalist Movement (William Pace). Krome partoprenis du observantoj de Esperanto Society of New York (Thomas Eccardt kaj Yingjie Zhang).

Mark Fettes preparas nun artikolon por la revuo *Esperanto*; tie vi legos pliajn detalojn pri la seminario. ★

*– Rochelle F. GROSSMAN*

## Sony Plaza

La lasta neformala kunveno ĉe Sony Plaza estis aparte interesa. Pli-malpli ok membroj de ESNY kunvenis dimanĉon la 6-an de majo kaj parolis pri politiko, kulturo, ktp. Ni iomete diskutis pri plurlandaj geedziĝ-ceremonioj kaj ankaŭ pri la politika situacio en la Ryukyu insuloj.

Por ĝui ekzotikajn konversaciojn, vi devas nur ĉeesti la venontan kunvenon ĉe Sony Plaza. ★

*– Tom ECCARDT*



## Marta eŭropa vojaĝo – dua parto (el tri)

**Rimini** estas bela marborda urbo, kiun mi vizitis la 12-an de marto dum mia vintra/printempa eŭropa vojaĝo en 2001. Mi parolas la italan, do mi konversaciis kun la estro de la hotelo, kie mi restis. Li prunte donis al mi biciklon, kiun mi rajdis al la ĉefaj vidindaĵoj. La sekvan tagon, mi buse vojaĝis al San Marino, sendependa landeto tute interne de Italio. **San Marino**, la plej malnova respubliko de la mondo, ne havas marbordon, sed ĝi situas ĉefe sur montoj. Dum pasintaj jaroj, troviĝis en San Marino la sidejo de Akademio Internacia de la Sciencoj. Bedaŭrinde, dum mia vizito, mi trovis neniun esperantiston tie.

Mi reiris al Rimini vespere, kaj la venontan matenon mi suriris trajnon por Zuriko. La vojaĝo tra Svislando estis belega: neĝkovritaj montoj, lagoj, ĉaledoj — la tipe svisa pejzaĝo de filmoj. En **Zuriko** mi restis kun Rolf kaj Natali ERNST, vegeteranaj hinduismaj geesperantistoj. Li ankaŭ estas spertulo pri *fengshui*, la ĉina metodo por decidi kiel aranĝi aferojn kiel domoj kaj konstruaĵoj, kaj ŝi povas paroli ĉine. Mi piediris tra tiu multekosta urbo negoca, kiu tamen enhavas vidindaĵojn kiel antikvan astronomian observejon kaj landan muzeon pri svisa kulturo.

Post Svislando, mi daŭrigis al **Freiburg**, Germanio, kaj restis en la najbara urbo **Gundelfingen** kun la esperantista familio WESTERMAYER. Manfredo estas verdulo, kaj kampanjis dum loka elektado. Dum mia restado ĉe ili, mi veturadis al **Weisweil**, la hejmvilaĝo de miaj prapatroj. Ne-esperantista konatulino de Manfredo loĝis en Weisweil, kaj ŝi montris ĝin al mi, kaj klarigis iom pri ĝia historio en la germana lingvo. Weisweil estas sur la landlimo kun Francio, kaj ĝi estis 95% detruita dum la dua mondmilito. Kvankam antaŭe estis multaj Eccardtoj tie, eĉ kun nomoj inskribitaj en monumento pri la unua mond-milito, ĉiuj homoj kun mia nomo aŭ elmigris aŭ mortis. De Weisweil mi vojaĝis al unu el la du oficialaj ĉefurboj de Eŭropo. Ĉi situas en Francio, sed oni parolas tie la germanan. Ĉu vi povas diveni ĝian nomon antaŭ junio kaj la lasta parto de mia "taglibro"? ★

*– Tom ECCARDT*

## Societa kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj! Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

**Majo 18**

**ESNY Kunveno**
**Prelego de Tomoko Yamashiro**
***Kulturo kaj Lingvoj de Okinawanoj en Japanio kaj Bolivio***
*Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT*

**Junio 3**

**Tagmanĝo**
*Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe SONY Plaza*
(Limdato por kontribuaĵoj por *Prismo* 105)

**?**

**ESNY Pikniko**
*Ni elektos daton kaj lokon dum nia maja kunveno.*

**United Federation of Teachers (UFT)**
260 Park Avenue South, NYC
(20th/21st Streets), second floor
(check schedule in lobby for room number)

**SONY Plaza Atrium**
Madison Avenue (55th/56th Streets) NYC
Street level, in the Atrium

## Esperanto ĉe pulmerkato

Ĉi semajnfine (la 19-an kaj 20-an de majo), okazos granda 'pulmerkato' (flea market) tra la stratoj de Stuyvesant Town kaj Peter Cooper Village (inter la 20-a kaj 23-a Stratoj kaj Unua Avenuo kaj Avenuo 'C' en Manhattan). Tiu ĉi merkato estas jara printempa evento, en kiu la lokaj loĝantoj vendas siajn aĵojn (librojn, meblojn, vestaĵojn, aparatojn, ktp.). Kutime, pli ol du mil homoj starigas tablon. Tom Eccardt kaj la familio Medrano, loĝantoj de Stuyvesant Town, havos propran lokon ĉe la merkato. Tamen, anstataŭ vendi, ni intencas informi pri Esperanto. Vi ĉiuj estas bonvenaj kaj helpi pri la propagandado kaj viziti la Esperantan tablon dum vi butikumas ĉe la merkato. En la pasinteco, multaj el vi helpis nin kaj ankaŭ ĝuis la etoson de la najbaraĵo. Do, bonvolu aliĝi kun ni ĉi semajnfine. Vi ne nur helpos vian lokan movadon sed eble vi trovos tiun perfektan aĵon, kiun vi serĉadis dum jaroj (kaj espereble je nekredebla prezo!). Por pli da informo, aŭ telefonu al Tom: 212-477-6516 aŭ venu al nia maja kunveno. ★




*– Nancee MEDRANO*


ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO
c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

Prezidanto: Thomas Eccardt (212) 477-6516
Koresponda Sekretariino: Rochelle F. Grossman (718) 457-1490
Protokolisto: Stuart Green (631) 751-5683
Vicprezidanto: Thomas Leong (718) 981-4252
Kasistino: Sofiya Soskina (718) 671-5699
Program-Direktorino: Susan Kohn (212) 226-0443



**Novjorka Prismo**
Numero 104 – Majo 2001
ISSN: 1059-5627
http://members.aol.com/novjorka/prismo

Redaktoro: Jim Medrano (212) 982-5029
Subredaktoroj: Thomas Eccardt, Nancee Medrano
Desegnistino: Mary Pulley

Sendu kontribuaĵojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: jimmedrano@mac.com


© 2001 Esperanto Society of New York